1-a Jaro, N-o 25

APERAS S.A.T. SEMAJNE

19. Marto 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Gvidanto: E. LANTY
24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI.

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

SAKALINO

Ne ĉiu leganto de "Sennaciulo", studinta geografion ne pli ol ordinare, eble konas tiun ĉi forgesitan insulon ĉe orientaj bordoj de Azio.

Tamen dum pli ol 1½ jaroj ĝi estis tiu nedigestebla najlo por ŝarkoj de japana imperialismo, sur kiu pendiĝis rus-japana konferenco. Komence en Dajren, post longa tempspaco en Ĉanj-Ĉuanj ĉiam senrezulte tiu insulo estis la ĉefa temo de l' daŭraj traktadoj inter rusa kaj japana delegacioj. Nur dum lasta konferenco, kiu rezultigis japan-sovetan traktaton, la demando pri Sakalino estis solvita preskaŭ definitive. La japana delegacio cedis en "najla" demando kaj japana registaro devas nun evakui nordan duonon de Sakalino.

Ke l' japana burĝaro ĉiam celis posedi tiun insulon, tio ne estas mirinda.

La centro de Sakalina demando ĉiam estis tiea nafto, kiu nature tiklis flarsenton de kapitalistoj en najbara Japanio. La plej bonan karakterizon de tiu demando donas japana jurnalaro mem, kies koncernaj artikoloj koncize estis cititaj en eŭropaj jurnaloj. "La firma pozicio de Japanio", — skribis iam burĝaj japanaj jurnalistoj, estas bazata sur financaj konsideroj. Japana popolo (kies volon oni neniam demandis) rajtas ricevi la koncesion por ekspluateblaj naftejoj de Sakalino, eĉ sole pro tio, ke japana registaro elspezis pli ol 700 milionojn da ienoj por ekonomia helpo al Orienta Siberio, pro tio ke ĝi perdis 700 soldatojn, mortigitajn dum konflikto en Nikolaevsk ĉe Amur, ke ĝi ĉiujare elspezas pli ol 70 mil-n da ienoj por la armeo, okupanta nordan Sakalinon.

La argumentoj de japana burĝaro estas vere unikaj. La financaj oferoj por forgesita loĝantaro de Orienta Azio kaj 700 mortigitoj devas, laŭ ĝia opinio, pravigi raban ekspluatadon de karbaj kaj naftaj minejoj en rusa teritorio de Sakalino.

Pri mastrumado de japanaj okupantoj en Sakalino oni ĝis nun preskaŭ nenion sciiĝadis. Granda, forgesita insulego kun maldense loĝantaj 6000 rusoj ĉe kolosatraj provizoj de nafto, karbo kaj arbaro, apartigita de l' kontinento per Tatara markolo, jam dum 6 jaroj ĝemas kaj sufokiĝas sub administrado de japanaj armiloj. Inkluzive la mizeran gazetaĉon, kiu eldoniĝas en administra centro de Sakalino — urbeto Aleksandrovsk, ĉio tie estas adaptita por akceli la plej rapidprocedan ekspluatadon de minejoj, raban elhakadon de l' arbaroj kaj eksporton de karbo en Japanion. La urba magistrato en Aleksandrovsk konsistas el komercistoj kaj caraj oficistoj, kiuj post la revolucio sukcesis rifuĝi en Sakalinon. Kaj tiu ĉi administracio estas estrata de l' ĉefkomandanto de l' japana okupanta armeo, ĉe kiu estas fondita speciala administra fako por enlandaj aferoj de Sakalino.

La enlanduloj iam estis okupataj en tri laborbranĉoj: transportado, agrikulturo (brutbredado kaj fiŝkaptado) kaj malgranda % de ili sin okupis pri komerco.

Per kio la enlandulo povas sin okupi nun? La transportado de ŝarĝoj nun estas organizita per japana transporta kompanio.

La produktaro de terkulturo malgrandiĝis je 30%. Nun agronomia helpo tute ne ekzistas, ĉiaj agronomiaj institutoj — kiel brutkoitejoj, konsultejoj kun modele organizitaj terkulturejoj, veterinaraj kuracejoj, — estis likviditaj. Ĉu oni povas perlabori per fiŝkaptado? Sed ankaŭ en tiu ĉi branĉo japanoj elmontris siajn apetitojn. La plej bonaj kaptejoj estis farmigitaj al japanoj, la restantaj duavice — al koreanoj kaj nur lastvice — al rusoj. La sola okupo restas por sakalinanoj — nekvalifikita manlaboro. Sed ankaŭ en tiu ĉi branĉo labormanko por enlanduloj estas akute sentata, ĉar unuavice estas dungataj japanoj kaj koreanoj, maloftiam — rusoj. Tia ĉi dungpolitiko estas komprenebla pro la faktoj ke ĉiuj laboroj estas entreprenataj de japanaj industriistoj kaj japana milita ministerio. Tial la enlanduloj ĉiujare elmigradis sur kontinenton, kiam vintre Tatara markolo estis kovrita de glacio. Nur la kontrabandistoj, kiuj liveras japanajn manufakturaĵojn por kontinento sufiĉe prosperas. Sed la plej notinda okupo en Sakalino estas la drinkado. Pri tio la japanaj administrantoj ĉiam zorgis, ĉiel akcelante la importadon de l' alkoholaĵoj.

Pro deficito de l' ŝtata buĝeto de Japanio, kaj postsekvoj de la tertremo, la elspezoj por okupanta armeo estis kompensataj el lokaj impostoj. Tiuj impostoj, ŝarĝe premantaj enlandan loĝantaron, malriĉan kaj malsatantan, ekskluzive estis uzataj por provizado de l' armeo. Ĉu ili ne konsistigas la sumon de 70 mil-n da ienoj, kiun japana burĝaro kalkulis kiel la elspezojn por okupado?

Japana invademo aktiviĝis de 1922 j., kiam oni eltrovis Sakalinan nafton. La japanaj okupantoj interesiĝas precipe pri okcidentaj kaj orientaj bordoj de l' insulo. La mezajn regionojn ili bonkore lasas al malsatantaj enlanduloj. La apudbordaj

regionoj estas preferindaj ankaŭ pro perŝipa komunikado. Japanaj entreprenistoj sen grandaj kostoj ĉiujare eksportadis el Sakalino 80 000 tunojn da karbo kaj 70 milionojn da kubfutoj da arbaraj materialoj. Ĉiuj konstruaĵoj estas destinitaj precipe por loĝado de soldatoj kaj japanaj laboristoj ĉirkaŭ karbominejoj kaj naftejoj.

Ĉiuj konstruaĵoj havas provizoran karakteron inkluzive la mallongan fervojon (50—60 km) por transportado de l'nafto. Oni konstruis nur tion kio estis provizore bezonata por japanoj mem. La ceteraj konstruaĵoj — kuracejoj, ŝoseoj, la domoj por administracioj, estas malzorgataj kaj neniom riparataj.

La veraj mastroj de Sakalino estas du japanaj firmaoj — Mucubisi kaj Micui, kiuj ekspluatas la plej profitdonajn minejojn. La ceteraj minejoj kaj naftejoj, kiuj ankoraŭ ne estis konfiskitaj de l'japanaj diktatoroj, pro akuta ekonomia krizo preskaŭ ne funkcias.

Ĝis tia stato malprogresigis la insulon ĝiaj protektantoj, kiuj dum japan-sovetaj konferencoj pretendis ricevi malavaran rekompencon pro sia rabada politiko.

Nun, rezulte de japan-soveta traktato, Sakalino estas evakuenda. La japanoj rajtos nur ricevi koncesie ne pli ol 50 % de naftozaj areoj laŭ specialaj kontraktoj kaj samkondiĉe ekspluati la karbominejojn.

Antaŭ malsatantaj insulanoj malfermiĝas nun belaj perspektivoj de l'ekonomia renaskiĝo sub regado de Sovetoj.

N. Krassovski.

Antikristana movado en Ĉinio

Studentoj-“antikristoj“

La kristana eŭropa kaj amerika gazetaro en Ĉinio estas maltrankviligita. Aktiva antikristana movado eksplodas ĉe ĉinia studentaro, precipe en misiistaj lernejoj kaj universitatoj.

Ĉie estas fonditaj antikristanaj ligoj. En Nankin studentoj publike detruis bibliojn. En Kanton dum kristnasko studentoj-“antikristoj“ organizis gajan karnavalon. En misiista universitato en Ĉanŝa (prov. Ĥunanj) studentoj postulis sendevigan “diservon“.

Tre nature estas, ke post tiaj faktoj misiistoj ŝanĝis sian psalmokantadon en ĝemblekon pri “bolŝevismo“. Tamen je tia bleko studadas ne ĉiuj misiistoj. En Tjanj-czin antaŭnelonge ekaperis duo da naivaj misiistoj, kiuj provis esti “honeste konsekvencaj“ kaj starigis problemon pri la disigo misiismon de imperialismo. Ili deklaris, ke la religia propagando devas rifuzi la oportunaĵojn, kiujn metas je ĝia dispono la imperialisma internigo al Ĉinio, t. e. misiistaro en sia laboro devas apliki nek eksteritoriecon, nek socian juĝadon ktp. Sed la naivajn kuraĝulojn sufokis preskaŭ laŭtekste tuta misiista “frataro“, faliginta sur ilin tutan sian plej kristanan indignon pro tiel malestima rilato al la sanktaĵoj de la kirasa pugno, sen kiu, laŭ komuna konfeso de misiistoj, oni ne povas starigi sufiĉe fortike la sanktan krucon en Ĉinio.

Tajpinga sperto.

La antikristanismo en Ĉinio antaŭiras antiimperialismon kaj naskas ĝin. Ĝi havas la plej profundajn radikojn en la ĉinia socio kaj havas pli ol duoncentjaron de ekzistado. Ĝi estas rekte kunligita kun la tiel nomita movado de tajpingoj (1850 ĝis 64), kiu estis amasa, popola ribelo kontraŭ la manĝuria dinastio kaj disvolviĝis en granda interligo kun kristana propagando, de kie naskiĝis la penso pri kreo de “ŝtato de malriĉuloj“. La medio, aktive nutrinta kaj inspirinta la movadon, estis ĉinoj-kristanoj, kiuj supozis, ke eŭropanoj-kristanoj konservos rilate al ilia movado, pasivan se ne amikan neŭtralecon.

Sed okazis alio. Anglaj kapitalistoj kun subteno de la francaj kaj italaj decidis, ke la biblio estas bona por kantadi ĝin ĉiudimanĉe, sed tute ne por konstrui laŭ ĝi ŝtatojn, kaj mobilizis soldatojn por defendi la manĝurian dinastion kontraŭ tajpingoj. Kvar jarojn daŭris ĉi-humiligo, kiu transiris en abomenindan buĉadon.

Post la tajpinga buĉado la eŭropa kristanismo, kiu havas en maldekstra mano la biblion, kaj en la dekstra — pafilon, tute perdas sian krediton ĉe ĉinaj amasoj, kaj la antaŭa simpatio ŝanĝiĝas en malamegon.

Sklaviga rolo de misiistoj

Studentoj bonege komprenis la socian esencon de misiistoj — lakeoj de komercista ĉeflibro kaj intervencia pafilo; krom tio, ili tre bone komprenis ankaŭ alian flankon de agado de ĉi-predikistoj de frateco kaj amo, nome, organizitan sub kovrilo de bonfarado insistan agitadon inter ĉina malklera proletaro kontraŭ elementoj, organizantaj memkonscion kaj solidarecon de la proletaro.

En “Nord China Daily News“ de 16. dec. 1924 en longa artikolo, sumiganta agadon de misiistaj organizaĵoj inter 500 000 rikŝoj de Ŝanghao, estas cifero de propagandkunvenoj — 7 200, kiujn partoprenis 409 000 homoj. Kaj ankaŭ ĉi-tie oni klarigas, kiajn, krom religiaj temoj, malekleziajn temojn oni enbatadis en la kapoj de la malkleraj kulioj dum la kunvenoj. La temoj estas du: unua — penetrigi en rikŝojn spiriton de nobleco, ĝentileco, de bona konduto kaj akcelo al registaro. La dua temo — *lukto kontraŭ strikmovado.* Jen kion diras la raporto:

“Agitantoj ofte agadas inter rikŝoj kaj ĝenerale inter laborulaj grupoj de loĝantaro, instigante al strikoj kaj malordo. La misio insiste provas ĉesigi la pereigajn penadojn, sugestante al la homoj, ke ilia espero je atentemo kaj helpo povas bazi ekskluzive sur ilia propra peno kaj bona konduto“.

Do, tio estas tre detale kaj pripense ellaborita programo de sklavigo de malkleraj laborulaj amasoj de Ĉinio, plifortigita de sistemo de filantropaj donacoj.

Kial do estas terura tio, ke junularo, konstruanta novan Ĉinion, tiel malamegas ĉi-estingantojn de ĉinia nacia kaj klasa memkonscio? Ni kontraŭe devas admiri la mirindan kulturan persiston kaj disciplinecon de ĉinia junularo kaj sindetenon de protestoj. Misiistoj faras furiozan, bone pagatan laboron, dezirante formi el Ĉinio “fabrikejon de sklavoj“.

Ĉi tio ne efektiviĝos. Neestingebla, sed kreskanta antikristana movado de ĉinia junularo kaj amaso estas por tio garantio.

El “Pravda“, 15. febr. 1925 trad. A. Tomo 3712

Vivkostoj en Anglio

La direktiĝo de okazaĵoj ĉi tie rilate al la vivkostoj ĉiutage fariĝas pli minaca kaj peniga ĉe la laboristaro. Antaŭ kelkaj semajnoj plialtiĝis la panprezo, tiel ke la kosto sole de tiu ĉi ĉefnutraĵo de la popolamaso estas nun 250 procentojn pli alta ol antaŭ la granda milito. La aŭtoritatoj tamen asertas, ke la vivkostoj nuntempaj superas nur je 80 procentoj la antaŭmilitajn; tio estas la “oficiala“ cifero. Pli ampleksa kaj pli vera takso estas 150 procentoj: oni do sin turnu al la sekvanta tabelo de kelkaj el la plej necesaj vivrimedoj, kiujn la laboristklasaj familioj devas aĉeti ĉiusemajne:

Vivrimedoj	*Kostoj* antaŭmilitaj	*Kostoj* nuntempaj	*Procenta pliiĝo*
Pano. . .	2 pencoj po 2 funtoj	$5\frac{1}{2}$pencoj	250
Alumetoj	$1\frac{1}{2}$ pencoj po 12 skatoletoj	10 pencoj	560
Sukero. .	$1\frac{1}{2}$ po funto	$3\frac{3}{4}$pencoj	150
Karbo . .	1 ŝil. po 112 funtoj	2 ŝil. kaj 6 pencoj	150
Viando (angla)	8 pencoj po funto	1 ŝil. kaj 4 pencoj	100
Teo . . .	1 ŝil. kaj 4 pencoj po funto	2 ŝil. kaj 8 pencoj	100
Terpomoj	$\frac{1}{2}$ penco po funto	$1\frac{1}{2}$pencoj	200

La prezoj de aliaj varoj, de mebloj, vestoj ktp. ankaŭ restas tre altaj, sed la plej granda pliiĝo ĉiam montriĝas ĉe la nutraĵoj de la laboristaro: oni ja povas kaj devas deteni sin je novaj vestoj kaj similaj aliaj aĵoj, kiom ajn bezonaj ili estas, sed el pano, viando, teo, el tiuj plej necesaj konsumaĵoj, kiujn ĉiuj devas havigi al si, la kapitalistoj jam tiris kaj ankoraŭ tiras bonegan profiton.

Kontraŭ la prezalteco de vivrimedoj estas tre interese atenti la fakton, ke oni tiajn komercaĵojn, kiaj estas aŭtomobiloj por la riĉuloj, kaj la de ili uzata petrolo por la veturigo, kompare kun la aliaj vivrimedoj suprecititaj, sufiĉe malplikariĝis. La laboristklaso kompreneble ne uzas tiujn ĉi luksaĵojn, nek kiel manĝaĵojn, nek veturilojn; nur la riĉuloj profitas ĉiusence. La ŝarĝo sub la nuntempa reĝimo ĉiam kuŝas sur la dorso de la laboristaro. *Ofiro.*

La varbado komenciĝis. Kie restas via varbrezulto?

Konsekvenco de l'Dawes'a Plano por la franca proletaro

En la ĵurnalo "L'Usine" ("La Uzino"), organo de l'franca mastraro de l'metalurgio, n-o de la 21. febr. oni povas legi la sekvantajn liniojn:

"Plurfoje ni atentigis en "La Uzino" pri la pli kaj pli proksimaj minacoj de senlaboreco.

Oni unue asertis, ke tiu krizo estus limigata je kelkaj fakoj kaj kelkaj urboj.

Ŝajnas nun, ke estas tute aliel. Kiel pruvo sufiĉas la deklaracioj faritaj de l' "Oficiala Ĵurnalo" mem en ĝia raporto pri situacio de l'merkato de laboro. Interalie ni tie legas:

Departemento de l'*Nordo*. — En la urboj Roubaix kaj Tourcoing la situacio de la lanaja industrio pligraviĝas. La dispecigejoj nelaboris dum kelkaj tagoj, eĉ dum kelkaj semajnoj; la kombilfabrikejoj estas malpligrandigintaj sian dungitaron je 35 ĝis 40%; la lanfadenfabrikejoj laboras nur 5 tagojn po semajno. Ĝis nun laborado estis normala ĉe lanteksejoj, glazurejoj kaj tinkturejoj, sed pro malplinombriĝo de l'mendoj senlaborado antaŭvidiĝas dum tre proksimaj tagoj.

Lin- kaj kotonfadenfabrikejoj ricevas nur malgrandajn kaj nemultnombrajn mendojn, kelkaj el ili laboras por provizado; sed pro kareco de l' krudaĵoj estas nefacile por ili produkti grandan provizon. La tolteksejoj ankaŭ malplirapidigis sian produktadon; certaj inter ili laboras nur 30 horojn semajne.

En metalurgio: situacio ankaŭ malbona escepte ĉe uzinoj por konstruado de rulaĵilaro.

En konstruindustrio senlaboreco pligrandiĝas. Departementa oficejo ne povas trovi laboron por senlaboruloj.

Laboro ankaŭ malmulte aktiva en lignoindustrio.

Departemento *Pas de Calais*. — Laborado daŭrigas malmultiĝi por rekonstruindustrio. Senlaboruloj inter la masonistoj.

Departemento *Somme*. — Trovi laboron por nespecialistoj kaj manlaboristoj estas tute malfacile.

Departemento *Ardennes*. — Situacio daŭrigas esti malfacila en konstruindustrio pro malplirapidigo de la laboroj en ruinigitaj regionoj. Ĉe metalurgio aktiveco grave malgrandiĝis.

En regiono de l'*Urbo Nantes*. — Industria situacio neaktiva.

En urbo *Reims* — grava senlaboreco inter la konstrulaboristoj.

Departemento *Seine* (Paris kaj ĉirkaŭaĵo) — Laboro malpligrandiĝas ĉe la elektrentreprenoj, precipe por la muntistoj-instalistoj. Dungiĝo malfacila por aŭtomobilkondukistoj.

Regiono de l'urbo *Lyon* — mallongiĝo de l'taglabordaŭro ĉe tinktur- kaj presejoj por silkŝtofoj. Aktiveco ankaŭ malgrandiĝas ĉe vest- kaj ŝu-industrioj. Senlaboreco grava ĉe la manlaboristoj. Senlaboreco ankaŭ ĉe panejlaboristoj."

Tiaj estas la sciigoj liveritaj de "l'oficiala ĵurnalo". Ili plene konfirmas ti-kiujn ni posedas, kaj eĉ ili ŝajnas iom prokrasti kompare al novaĵoj ricevitaj de niaj korespondantoj.

Fakte, en regiono de l'urbo Saint-Etienne, la situacio ne ŝajnas pli bona; oni rimarkas tre grandan malpliiĝon de aktiveco ĉe la industrioj de l'regiono, precipe ĉe la industrio de bicikloj. Oni eĉ parolas pri fermado de kelkaj uzinoj. La kvanto de laborpetantoj kiuj ne trovas laboron ĉiam pligrandiĝas; ĝi nombris 14550 ĉi-semajne kontraŭ 13030 lastsemajne.

En departemento de l'Nordo, situacio graviĝas ankoraŭ; delegitaro de l'senlaboruloj postulis rendevuon de la prefekto kiu nur povis al ĝi donaci .... belajn promesojn.

La ĉi-supraj sciigoj devenas de l'burĝoj; la vero estas multe pli grava. Ekzemple en mia vilaĝo, kiu nombras apenaŭ 2000 loĝantojn, estas hodiaŭ 140 senlaboruloj (evidente en tiu nombro mi ne kalkulas ti-kiuj de sia naskiĝo komforte vivis neniam laborante).

En urbo Douai, grava metalurgia uzino "Arbel" maldungis sian preskaŭ tutan laboristan personaron, ĝi alproksimiĝis — laŭ certaj diroj — la bankroton kaj saviĝis nur per kunfandiĝo kun alia grava metalurgia asocio.

En la proksimaj karbminejoj la situacio de la laboristoj ne estas multe pli bona. Ĉi-tie ankaŭ la francaj laboristoj ne ricevas laboron; pro plej malgranda kulpo oni estas forpelata el la minejo.

Dum tiu tempo la franca mastraro, je kunkulpeco de l'registaro organizas grandskale la enmigradon de polaj laboristoj, kiuj baldaŭ pligrandigos la nombron de la senlaboruloj.

Francaj mastraro kaj registaro esperas starigi francajn kontraŭ polaj laboristoj; sed ili iluziiĝas, — ni revoluciuloj en Francio, aktive okupiĝas por organizi niajn fratojn venintajn el eksterlando. Jam lastjare en karbminejoj okazis striko, niaj polaj kamaradoj pli brave strikis ol certaj francoj.

Ni ne scias, kion pensi pri konduto de l'francaj industriistoj kaj registaro; ŝajnas al ni, ke ili organizas la Revolucion; des pli bone! Tion kion ili semas, ni rikoltos.

Robert Soudant SAT-ano 140, 5a sektoro



Freneziĝinta pro maljusteco[1])

Bartolomeo Vanzetti, akuzita kaj kondamnita pro krimo, je kiu neniu kiu konas la travivaĵojn de la homo, aŭ kiu per tolerema menso legis la atestaĵojn, kredas lin kapabla aŭ kulpa, rompiĝis pro la streĉiĝo de preskaŭ kvinjara batalo por sia libereco kaj vivo. Post raporto de kuracistoj li estis portempe enmetita en frenezulejon.

Vanzetti ne estas la unua freneziĝinta viktimo de maljusteco. Ju pli alta estas la mens-kalibro de la akuzito, des pli rapide tia stato povas okazi. Tia persono sentas tiel akran animan naŭzon pro la maljusteco, ke ĝi baldaŭ malfortigas la korpon kaj menson; precipe en okazo kiel tiu de Vanzetti, ĉar li devis submetiĝi al kutima malbonuzo — la sorto de pro mortigo akuzitaj ribeluloj en kapitalistaj ŝtatoj.

El la tri doktoroj, kiuj ekzamenis Vanzetti nur unu, D.ro Meyerson montras iom percepte la veran kialon kiu estis responda por la mensrompiĝo. La aliaj du kuracistoj, estas preskaŭ nenecese mencii, estis dungitoj de la ŝtato Mesaĉusets. La du doktoroj en sia raporto konstatas kiel pruvon de lia malsanstato la "fakton" ke li kredis la jenon: "komploto estis direktita kontraŭ lin por leĝmortigi lin, kaj ke multaj atestantoj en la proceso estis falsĵurantoj".

Eble tiuj doktoroj ne scias ke la raportistoj kiuj ĉeestis la procesojn, la advokatoj kiuj legis la atestaĵaron kaj miloj da personoj kiuj scikonas la proceson ankaŭ kredas ke Vanzetti estis maljuste kondamnita kaj ke atestantoj falsĵuris.

Tiel malmulte ili dubas pri tiuj ĉi du faktoj ke ili ekkomencis la plej memorindan en la historio batalon por savi la vivojn de Vanzetti kaj lia kunulo-viktimo Sacco.

Ne estas la *kredo* de Vanzetti, ke komploto estis organizita kontraŭ lin kaj ke falsĵurantoj estis uzataj por kondamni lin, kiu pruvas lian portempan frenezecon. Male, estas lia absoluta scio ke estis kontraŭ li komplotate, kiu eknaskis en li animan naŭzon kaj kiu havis kiel rezulton almenaŭ portempan renverson de lia bonega spirito.

La lukto por akiri almenaŭ iagrade la juston de ti-kiuj kontrolas la vivojn kaj tial la liberecojn de la popolo, estas longedaŭrinta kaj laciga. Daŭris pli ol kvar jarojn por malfermi la pordojn de la karceroj kie kuŝis la viktimoj de la milit-histerio; sed tio estis finfine farita pro senĉesa persistemo. Sacco kaj Vanzetti kaj Mooney estas ankoraŭ malliberigitaj, ankaŭ aliaj malliberuloj kies sola krimo estis propagandi por pli justa sistemo ekonomia. Se iliaj eksteraj kunlaborantoj forlasas ilin, kien ili povas turni sin pro helpo? *Georgo Saville.*

1) Por la profito de ti-kiuj scias nur malmulton aŭ eble nenion pri Sacco kaj Vanzetti, mi devas mencii ke tiuj du kamaradoj estis antaŭ ĉirkaŭ 5 jaroj false akuzitaj kaj post kelkaj procesoj mortkondamnitaj pro rabado kaj mortigo. La procesoj decidigis laboristaron tra la tuta mondo al protestmitingoj kaj monkolektado.

La faŝismo en Bulgario

Antaŭ nelonge en Bulgario ekkomenciĝis novaj bataloj inter kapitalistoj kaj laboristoj. Sur unu flanko batalas la laboristoj kaj kamparanoj, sur la alia la tuta burĝaro inkluzive burĝlakeaj laboristoj. Nuntempaj bataloj bazas sur la mortigado de spiritgvidantaj kaj viglaj laboristoj. Ĉar burĝoj vidis, ke ili ne povas sufoki tiun ekflamiĝintan movadon, kiu ne lasas sin sufoki. Bataloj nun atingis plej akran akutecon. La faŝistaj bandoj persekutas laboristajn bandojn, kaj laboristaj bandoj postsekvas la faŝistajn. Tiamaniere oni batalas unu kontraŭ la alia. La faŝista registaro de tago al tago plialtigas la teroron kontraŭ laboristoj kaj kamparanoj. La registaro, dezirante likvidi la tutan revolucian movadon, intencas prezenti antaŭ deputitaro leĝprojekton, kiu pliakrigas la malnovan leĝon, en Bulgario nomatan "z. z. z." (leĝo por defendo de ŝtato). Ili antaŭvidas pli grandajn punojn kontraŭ ĉiuj, kiuj laboras kontraŭ la faŝismo. Tiuj estas persekutataj kaj juĝataj laŭ leĝo por defendo de la ŝtato. Ankaŭ la nova leĝo rajtigas la registaron, malpermesi la tutan opozician gazetaron. Du el tiuj gazetoj jam trafis tiu sorto, unu laboristan kaj unu kamparanan. La redaktoro de "Niaj tagoj" estas devigita urĝe forlasi Sofion. Li estas deŝirita de sia familio. Entute ĉiuj laboristoj, kiuj estas iom viglaj kaj forte klaskonsciaj, estas minacataj per aresto.

Antaŭ tri semajnoj okazis en Bulgario novaj mortigoj de laboristaj spiritgvidantoj. Ĉiuj mortigitaj personoj estas bonaj publicistoj. Mortfalis la jenaj laboristaj gvidantoj:

Valĉo Ivanov, eks-komsekretario en Sofio, ankaŭ komunumkonsilanto kaj sekretario de instruista organizaĵo. Li estis premsufokita.

Anton Straŝimirov, kom. deputito de Varna regiono, ekskomunumkonsilanto. Ankaŭ redaktoro de gazeto "Varna laboristo".

Daskolov, de vilaĝo Dedovo, Plovdiva regiono, ekssekretario de kompartio en urbo Plovdiv.

Kaj multaj aliaj mortigitoj, sed ili ne estas malkaŝitaj de la laboristoj. Tiu teroro regos dumdaŭre ĝis kiam la perfortula registaro de la ĉefministro Cankov estos faligita. Tiam, ve al la bulgaraj klereguloj!

Zdravejkin

Ŝtata laborserva devo

Ŝtatoj venkitaj dum la lasta hombuĉado ne havas permeson de la venkintaj ŝtatoj, militistigi siajn landanojn laŭ plaĉo. Nur tiom estas konsentata al ili, kiom necesas por subpremi la revolucian movadon. Tiamaniere ili sendanĝeriĝas en la granda imperialista luktado, ili estas senpovigitaj, kastritaj.

Tamen la faŝista burĝaro, nun superinte la paralizon, post konsolidiĝo ekonomia (en Germanio) jam komencas transporti la atakon al sia amata militisma fako. Germana burĝaro intencas leĝigi ŝtatan laborservan devon.

Kion signifas tio? — *Oficiale,* — devigi la junularon, dum unu aŭ eble du jaroj serve labori por la ŝtato, kompreneble laŭ kazerna (punlabora) sistemo (kunvivo en kazernoj ktp.). *Neoficiale,* — 1) influi junularon patriote kaj militeme, 2) eduki al si bonan kontraŭagilon en okazo de strikoj. — En Germanio oni jam longe estus akceptinta tian leĝon, se oni ne ankoraŭ timetus la kolektivan kontraŭstaron de l'laboristaro. Ĉar kvankam batallaceco regas la laboristajn vicojn (oni bedaŭrinde devas konstati tion ĉe plimulto de laboristoj), ekribelo nova povus esti provokata per enkonduko de deviga laborservo aŭ simila sklaviga leĝo. Estas dubinde, tamen, ĉu eĉ la proletе organizita junularo en okazo de akcepto de tia leĝo kontraŭmetus tiun fortan reziston, kiu estus bezonata por malebligi ties plenumon.

H. Metzger, 3114.

Socia asekurado en USSR

Laŭ leĝaro pri laboro estas asekurata en Sovet-Unio ĉiu dungata laborulo, sendepende de tio, ĉu li estas okupata en regna, kooperativa, koncesia aŭ privata laborejo, sendepende de karaktero kaj longdaŭro de laboro. Asekurkotizon pagas entreprenoj, oficejoj, mastrumoj aŭ personoj, uzantaj dunglaboron, sen rajto subtrahi ĝin el salajrpago de l'asekurato.

Asekurito ricevas: 1) plenan senpagan medicinan helpon: hejman, malsanulejan kaj sanatorian; 2) plenan salajron en la okazo de provizora perdo de laborkapablo (virinoj, okupataj per fizika laboro, ricevas forpermeson kaj plenan kompenson dum 8 semajnoj ĝis kaj 8 sem. post akuŝo, oficistinoj dum 6 sem. ĝis kaj 6 sem. post akuŝo); 3) subvencion dum senlaboreco, atingantan ne malpli ol kvaronon de salajrpago kaj dum daŭro de ne malpli ol 6 monatoj; 4) subvencion en la okazo de porĉiama perdo de laborkapablo (invalideco); 5) ĉiujare dusemajnan aŭ monatan libertempon (depende de laboro). Krome ricevas subvencion neplenaĝaj aŭ nelaborkapablaj familianoj de l'asekurato en la okazo de ilia malsano aŭ morto de la familinutranto.

Malgraŭ tio, ke Sovetio troviĝas nun post la teruraj monda kaj civila militoj en tre mizera stato ekonomia, estas tamen en regiono de socia asekurado atingita tre multo. Aparte rimarkindaj estas la famaj "domoj de ripozo", kiuj estis lastatempe fonditaj en preskaŭ ĉiu urbo kaj urbeto de la vasta Sovetrespubliko. Por tiaj domoj oni ĝenerale utiligas somerloĝejojn kaj palacojn de la estintaj burĝaro kaj bienposedantoj. Somere dum forpermeso la lacigitaj en fabrikoj kaj uzinoj laboristoj ĝuas tie la libertempon, renovigante siajn konsumitajn dum jaro fortojn. La "domoj de ripozo" servas precipe por sanaj laboristoj. Por malsanuloj ekzistas multaj sanatorioj kaj kuracilokoj, plejparte troviĝantaj en Krimeo. Nunjare la Regna Asekuro (Gostraĥ) komencis ankoraŭ pli profundigi kaj larĝigi sian laboron. Kaj esperеble bonaj rezultaĵoj montriĝos tre baldaŭ. Tiel iom post iom la sovetia proletariaro, akirinta la ŝtatpotencon, plibonigas sian ekonomian situacion.

J. Zlotar, Leningrad.

La Malliberejo en Sovetlando

Metiunuiĝa Salajro

Jen modelo por ministrejoj de kapitalistaj landoj kiel kuraci la krimulojn de iliaj krimoj, anstataŭ ol fabriki krimulojn kiel ĉie nun en la mondo.

La delegitaro de Metiaj Unuiĝoj post sia reveno el Sovetlando raportas, ke la krimuloj, kiuj scias iun metion, estas laborigataj je sia propra metio en la malliberejoj; se ili preferas elekti ian alian metion, oni ĝin al ili volonte instruas.

Ĉiuj laboras nombron da horoj tage kaj ricevas salajron laŭ ĝeneralaj metiunuiĝaj reguloj. Anstataŭ mononi ili ricevas specialajn pagilojn, kiujn la familio de la malliberulo povas ŝanĝi je mono aŭ pere de kiu ĝi povas ricevi komercaĵon el kooperativa butiko ĉe la malliberejo.

Se malliberulo rifuzas labori, li tamen estas venigata en la laborejon, kaj estas permesate al li fari nenion. Kutime, vidante kamaradojn ricevi salajron kaj privilegiojn por sia laboro, li ankaŭ komencas labori.

Ne estas armitaj gardistoj

La gardistoj mem estas lertaj metiistoj, kaj ili estas la meti-instruistoj. Nenie oni vidas vipojn aŭ armilojn en la malliberejoj.

En unu el la laborejoj, viditaj de la delegitaro, laboris pli ol 100 krimuloj per marteloj, ĉiziloj, segiloj. Inter ili troviĝis 6 gardistoj-instruistoj kaj ĉirkaŭe promenis nur 2 milicianoj, sen iu videbla armilo.

Kaj ĉi tiuj malliberuloj estis ne politikaj kaptitoj, sed veraj banditoj, rabistoj kaj domrompistoj.

Dum horoj de la laboro viroj kaj virinoj laboras kune. Se geedzoj — ili laboras kune ĉe la sama maŝino aŭ metio.

La kooperativa butiko estas gvidata de la malliberuloj mem. Ili mem elektas komitatojn, kiuj organizas la tutan laboron.

Sistemo de ĉeloj solecaj ne ekzistas. Ĉelo estas nun dormoĉambro kun 10—12 litoj. Ĉiu havas rajton alporti aŭ havigi al si siajn proprajn kovrilojn, kusenojn aŭ matracon. Ili rajtas kuŝi sur siaj litoj dum tago, kio en burĝaj malliberejoj nenie estas permesata.

Oni manĝas en komunaj manĝejoj. Manĝo estas alportata de roto, elektita de la malliberuloj mem. Kaj ĉiu rajtas havi tiom da supo kiom li volas.

Ĉiu estas vokata per propra nomo, ne per ciferoj. Ili portas siajn proprajn vestaĵojn, kiel iu alia civitano de Sovetlando.

Raporto laŭ "Daily Herald" de *T. Suĵadinova.*

LA KVINJARO DE L' KAPP-PUĈO KAJ DE LA RUHR-RIBELO

Kiel la unuan fojon la germana reakcio provis restarigi la monarkion —
Kiel la laboristaro estis malhelpata plenumi sian historian mision — Ni lernu el la historio!

La 13. marto 1920 la ĉefurbo de Germanio estis okupata de kontraŭrevolucia armeo, gvidita de kapitanleŭtenanto *Ehrhardt*. Per simpla marŝo kun tute ne tro multaj soldatoj antaŭ la *Brandenburgan* pordegon, li kapablis rifuĝigi la registaron. Kune kun *Kapp, Ludendorff, Traub* k. a. estis intencate ekstarigi la diktaturon de l' monarkiema reakciularo. La rifuĝinta registaro enhavis 7 socialistajn ministrojn. Forpelitaj al Stuttgart, tiuj lerte sciis misuzi la proletaron por rekonkiri la ministroseĝojn kaj privilegiojn por la subula "negocparencaro". La proletaro facilkredeme bonkora kaj pensinerta ĉiam denove "prenas la maronojn el la fajro" por tiuj, kiuj dum danĝerplenaj horoj ĝin scias flatadi. Post liberigo la registaranoj enkarcerigas milojn da sindonemuloj. Nu, dum tiu momento ni rigardu la okazajojn. En aŭtomobilo rifuĝinte kaj alveninte sub ŝirma protekto de l' proletaro, la ministraro trumpetis jene en la landon:

Laboristoj! Partikamaradoj![1]

Militista ribelo furiozas! . . . .
Laboristoj kaj kamaradoj!
Ni ne faris la revolucion por resubmeti nin sub sangozan soldataĉan regadon . . .
Laboristoj kaj kamaradoj!
La laborrezultaĵo de tuta jaro disbatiĝos je ruinaĵo.
Via malfacile akirita libero pereos.

La tuto estas en danĝero!

Pro tio la plej akregaj rebatrimedoj estas necesaj. Neniu laborejo funkciu, ... dum tempo kiam regas la militista diktaturo de la Ludendorffanoj.

Pro tio for ĉia laboro! Strikadu!

Forprenu la aeron al la reakciema figentaĉo. Bataladu per ĉiaj rimedoj por la konservo de la Respubliko, flankenigu ĉian malkonkordon. Ekzistas nur unu rimedo por malhelpi la revenon de Vilhelmo IIa:

Malfunkciigo de ĉia ekonomia vivo!
Nenies mano sin movu!

Neniu proleto helpu al la militistara diktaturo!

Ĝenerala striko sur la tuta fronto!

Proletoj unuiĝu vin!
For la Kontraŭrevolucion!
La socialdemokr. membroj de l' regna registaro.
Ebert. Bauer. Noske. Schlicke. Schmidt. David. Müller.
La partiestro de la SPD.
Otto Wels.

Kaj la proleta leono leviĝis, ekskuegis sian hararegon, tiel ke la Kapp'anoj ektremis, sed ne nur tiuj, kiuj devis baldaŭ abdiki ektimis, — ne, ankaŭ la vokintoj de l' leono proleta ekvidis gravan danĝeron. En la Ruhr-regiono stariĝis kun fulmrapideco grandega ruĝa armeo de laboristoj kiu pelis la soldataron el la regiono, konkiris maŝinpafilojn, pafilegojn ktp. Rapide alia trumpeto eksonis post sendanĝeriĝo de l' ministroseĝaro:

Al — — Ĉiuj!
La
Ĝeneralstriko disrompiĝas!

En München, Nürnberg, Braunschweig kaj Frankfurt a. M., oni reeklaboras. En Hannover, Hildesheim, Bremen, tuta Silezio, Orientprusio, Schleswig Holstein, Württemberg, Hessen regas plena silento.

Neniu lasu sin erarigi per bolŝevistaj kaj spartakistaj mensogoj.

Restadu unuecaj kaj fortaj.
Starigu fronton kontraŭ la ĉion pereiganta **Bolŝevismo!**
En la nomo de l' regna registaro.
v. Seeckt. Schiffer.

Sed la "ruĝa" armeo en la Ruhr-regiono vidis antaŭ si la armeon de l' "blankularo", kaj ĝi konsciis kiom longe ekzistados ĉi tiu ekzekutistdungataro de l' kapitalo, tiom longe la danĝero por la proletara celo restados. Tial ĝi batalante persistadis.

Pri tiu grandioza proliberigo-movado, kiu estas treege instrua, skribas certe objektiva burĝa scienculo en libreto: "Artikolo pri historio kaj sociologio de l' Ruhr-ribelo en marto—aprilo 1920, de *Gerhard Colm*."

La situacio estis je la 22. marto proksimume la jena: La ruĝa armeo tenis la Lippe-fronton, kiun ĝi je kelkaj lokoj estis transpaŝinta. Sekve je la premo de la plej ofte kontraŭrevoluciaj ekzekutivsovetoj en la postlando kaj pro la de tie originanta sabotado[1]) ekiĝis intertraktado pri batalhalto kun la registaro. Pri la perfida rolo de ĉi ekzekutivsovetoj eldiras la verkanto sur paĝo 97:

"En kelkaj lokoj estis konstatebla kvazaŭ la solidareco inter la ekzekutivsovetoj — kiuj konsistis plejparte el parti- kaj sindikat-oficistoj — kaj la urbadministraro kontraŭ la ruĝa armeo. Certe ja ni vidis, ke la plej multaj el la ekzekutivsovetoj staris nur duone sur la bazo de l' revolucio".

La kontrakto okazis nur pro tiu premo eliranta de ĉi-kontraŭrevoluciaj sindikat- kaj partioficistoj, kiuj ĉiam kaj ĉie deklaris sin la "veraj" komisiitoj de l' popolo, sed kontraŭ la volo de l' ruĝa soldataro. La rezulto de ĉi-kontraktado inter la por ĉi-konsiladoj aperintaj partigvidistoj kaj la registaro estis kontrakto pri batalhalto, farita je la 23. marto, en kiu estas legebla:

". . . Neniu soldato (de l' registararmeo) staras tiom malproksime al sudo, ke, kiam la kontraŭulo haltigas siajn movadojn, hodiaŭ kaj morgaŭ ne okazi povas batalo . . . La laboristo-trupoj estas retrotirendaj[2]) ĝis sude de la Lippe . . . La vilaĝoj norde de fronto Dinslaken—Hünxe—Dorsten restas ne-atakotaj de registarotrupoj. — Por ĉi-interkonsentoj validas 24hora deklarotempo pri malvalidiĝo. Ili tuj ekvalidas."

Ĉi-kontrakto pri batalhalto devus ebligi kontraktojn kun la registaro, kaj tiu ĉi rezultigas, je l' sekvanta tago, (24. marto) la konatan Kompromiskontrakton de *Bielefeld*. Ĉi-kontrakto estu ankaŭ represata laŭ originalo por elmontri kion la registaro promesis sub la premo de l' laboristpafilaro.

Kontraktite en Bielefeld, la 24. marto 1920

La reprezentantoj el ĉiuj partoprenintaj partioj . . . deklaras, ke ili volas pro malkonfuzigo de la situacio deveninta el la Kapp-puĉo interkonsentigi siajn postulojn kun la registaro sur la bazo de ĉi-jena kontrakto:

1. *La ĉeestantaj reprezentantoj de l' registarpartioj uzos sian influon ĉe siaj frakcioj, ke, ĉe l' venonta novformado de l' registaro en Regno kaj Prusio, la demando pri la personoj estu solvota de la partioj post interkonsento kun ĉi-organizaĵoj, sindikatoj de laboristoj, komizoj kaj oficistoj partoprenintaj je l' ĝeneralstriko kaj ke al ĉi-organizaĵoj estu cedita decidpova influo je la novregulado de la ekonomiaj kaj socialpolitikaj statoj.*
2. *Tuja senarmigo de ĉiuj partoprenintoj je la Kapp-puĉo. Ne punotaj estu ĉiuj, kiuj dum batalo kontraŭ la nuna atenco pekis kontraŭ la leĝoj.*
3. *Radikala purigo de ĉiuj publikaj administracioj kaj laborejaj administracioj de kontraŭrevoluciaj personoj . . .*
4. *Plej rapida realigo de la administra reformo sur demokrata bazo je kundecido ankaŭ de l' ekonomiaj organizaĵoj de l' laboristoj, komizoj kaj oficistoj.*
5. *Tuja perfektigo de l' ekzistantaj kaj kreo de novaj socialaj leĝoj . . .*
6. *Tuja ekkomenco de l' socialigo de ĉiuj por ĉi-fako maturaj industribranĉoj . . . Transpreno de la karbo- kaj kalitrusto por la regno.*
7. *Disirigo de ĉiuj al la konstitucio ne lojale sin montrintaj kontraŭrevoluciaj militistaj organizaĵoj.*
8. *Efikplena ekpreno, eĉ eksproprigo de disponeblaj vivrimedoj kaj plifortigita kontraŭbatalo al la uzurist- kaj fimarĉandistaro en urbaro kaj vilaĝaro.*
9. *La laŭkonstitucia oficistaro administradas laŭ leĝa regularo. La nunaj ekzekutivsovetoj starigu en interkonsento kun la homunumestraro la lokan gardistaron kaj reguladu la armilfordonon. Tio ĉi devas okazi plej malfrue dum 10 tagoj. Post ĉi tiu tempo anstataŭos ĉi-ekzekutivsovetojn pororda komisiitaro el la organizita laborist-, komizkaj oficistaro.*
10. *Pro apogo de la laŭordaj sekurecorganoj estu starigata loka gardistaro en la forto ĝis 3 po 1000 loĝantoj.*
11. *Ĉiuj partoprenintaj promesas uzi sian influon, ke la laboristaro reiru al la kutima laboro. Al la labordonantoj estas konsilate redungi la revenontajn laboristojn.*
12. *Okazu tuja fordono de ĉiuj armiloj kaj municio.*
13. *Ĉiuj kaptitoj estu tuj, plej malfrue ĝis la 27. marto tagmeze, 12. horo, liberigotaj.*
14. *Ĉe lojala plenumo de l' kontraktaĵoj* ne *okazos enmarŝo de la registaraj trupoj en Rheinan-Vestfalian industriregionon.*
15. *La pliseverigita sieĝstato estu tuj nuligita.*
16. *La regna poŝtministro Giesbert parolos antaŭ la ministraro pri la demandoj de l' prizorgo de l' postrestintoj kaj vunditoj kun la celo, ke la kostojn transprenu la regno.*
17. *Nek al la laboristoj, kiuj partoprenis en la bataloj nek al la anoj de polico kaj loĝantargardistaro, nek al la anoj de la registaraj trupoj ekestu malavantaĝoj aŭ ĝenoj pro la partopreno.*

Giesbert, regna poŝtministro; Severing, Thielemann, Heinr. Meyer, Cuno, Stens, Imbusch, Kloft, Hamm, Dr. Jarres, Max Herbig, Paul Oettingshaus, O. Brass, W. Enz, Fritz Charpentier, O. Triebel, Mehlrich, protokolanto.

Jen tiaj estis la postuloj minimumaj, sub kiuj la proletaro de l' Ruhr-regiono estis preta ĉesigi la batalon. Kaj eĉ ne unu el la promesitajoj plenumiĝis flanke de la burĝaro. Kiu povus esperi sinceron de la gajnintoj de l' revolucio? Sed kiu kredus, ke dekomence la burĝaro kaj la registaro nur intencis trompi la proletaron **per la kontrakto**, disirigi la batalantojn, konfuzigi la laboristojn? Tamen tio estas la vero! Por tiu ĉi fakto jen du dokumentoj laŭ la verkanto supre citita. Li diras (paĝo 120):

"La regna centro por hejmservo, landadministracio Vestfalio, skribas pri la kontrakto de Bielefeld:

Temis elimini la rondojn, kiuj staras absolute malproksime de komunista programo for el la vicoj de l' ruĝa armeo. *Tio ĉi estis la politika tendenco de l' kontrakto.* Ĝi devis efiki lastvice kiel eksplodig-rimedo por la ruĝa armeo. Ĉi-celo estas plene atingita" (!) . . .

Sed la kontrakto de Bielefeld ne nur intencis efiki disige je la ruĝa armeo, ĝi devis

1) Estas la formo mem de l' alvoko

1) Saboti = intence fuŝi. — Red.
2) devas esti retiritaj malantaŭen. — Red.

efiki je la laboristaro en la tuta regno, ĉar ĝi (la laboristaro) estis en streĉita maltrankvilego . . .

La burĝa doktoro opinias pri tio: "Se tiu ĉi opinio . . . de l'politiko registara . . . vere estis aŭtoritata, tiam la reprezentantoj de l' registaro malpli estus kalkulintaj je fakta finigo de l'ribelo pacvoje, sed estus provintaj ekaranĝi disigon de la batalantoj por tiam subigi — se necese per armilpotenco — la spartakiste-sindikalistan movadon.

Kion la registaro vere intencis, klariĝas por ni per ĉi-jena tagordono donita al la registarotrupoj. Informilo n-o 6 de la 24.marto. (paĝo 119.):

Oni parolas pri faro de kontrakto pri batalhalto inter la defenddistrikta komandantaro kaj la bolŝevikaj trupoj. Pri tio tute ne estas parolo. La gvidisto de l'kontraŭula flanko deklaris, ke ili volas retropreni siajn trupojn. Kompenso de la flanko de l'defenddistrikta komandantaro ne estas certigata.

Por la ĉefo de l'generaloficiraro: Hanstein, Kapitano de la gen-oficiraro."

Oni atentu, tiamaniere parolas la defenddistrikta komandantaro post faro de l'Bielefeld'a interkonsento. Registaro kaj regna defendmilitistaro sentis sin tagon post tago, dum kiu oni kontraktadis, plifortiĝantaj, ĉar dume seninterrompe alrapidis novaj registaraj trupoj. La paroloj de la registaro de tago al tago pli energiiĝas. Je l'27. marto jam sentas sin la registaro sufiĉe forta por adresi ultimaton al la Essen'a centrosoveto, en kiu estas postulita tuja disirigo de l'ruĝa armeo, plena senarmigo, tuja liberigo de kaptitoj — ĉio nun jam senkondiĉe. La "bona" generalo Barono *v. Watter* donis por tio jenan plenumordonon (radiotelegramo kaptita de l'centra soveto je l'29. marto vid. paĝo 125):

1. "Se ne estos . . . ĝis 31. marto antaŭtagmeze je l'12a horo 4 pezaj maŝinpafiloj, 200 maŝinpafiloj, 16 minjetiloj, 20000 pafiloj . . . elliveritaj, tiam validas la kondiĉo pri armiltransdono kiel neplenumita.
2. . . . Se ekzistos ankoraŭ ekzekutivsovetoj je 30. marto, 11a horo antaŭtagmeze, tiam validas la kondiĉo pri respekto de l'ŝtataŭtoritato kiel neplenumita.
3. Se je la 30. marto, je l'11a horo antaŭtagmeze, ankoraŭ partoj de l'ruĝa armeo . . . estos armitaj, tiam validas la kondiĉo pri disirigo de l'ruĝa armeo kiel neplenumita.
4. Se troviĝos je la 30. marto, 11a horo antaŭtagmeze ankoraŭ kaptitaj regna defendsoldato, ŝirmsoldato, ano de l'loĝantardefendularo aŭ de la Essen'a aŭ Dortmund'a ŝirmpolicanaro, kiel kaptitoj en la manoj de l'*ribelantoj* . . . se ne estos liberigitaj ĉiuj garantiuloj, tiam validas la kondiĉo kiel ne plenumita.

. . . Se eĉ nur haro de kaptitoj aŭ garantiuloj estos elŝirita, tiam la kondiĉo validas kiel neplenumita.

sign.: *Barono v. Watter,* generaloleŭtenanto".

Bonrimarkite: Tiaj kondiĉoj, teknike neplenumeblaj ne estis komunikitaj oficiale al la centra soveto, sed estis kaptita hazarde la senfadena depeŝo! La senarmigon de tiom larĝa batalfronto oni postulis farita dum unu tago! Kaj se ne hazarde la centra soveto kaptus la depeŝon . . . . . ? Ĉi tiu senlime impertinentega provoko de la burĝaro kiu nun sin sentis sekurega, devis vipegi la ekscitegon de la laboristaro. La centra soveto alvokis por denova ĝeneralstriko; en la distrikto de Hagen, kie la "sendependuloj" havis la gvidadon, la laciĝemo aliiĝis je denova batalemo. "Reprezentantoj de l'ekzekutiva soveto pledis en Münster . . ., ili deklaris ke la persistado je ĉi-tiuj punktoj sekvigus la plej malbonon. Eĉ de plej modera tendencularo eliris plej akraj batalkrioj. La "Bergische Volksstimme" ("montlanda popolvoĉo") titolas je l' 31. marto artikolon: Prefere sub la regado de l' Antanto, ol sub la regna defendsoldataro. Batalo kun ĉiuj rimedoj, eĉ ĝis sabotado de l' industriaj instalaĵoj! Plej altan ekscitegon kaŭzis la ultimato en la vicoj de l' ruĝa armeo. Ili kredis: freneza estas tia postulo, ni, kiuj venkis ĝis nun forliveru la armilojn" ?!

Malgraŭ tio la burĝaro atingis, kion ĝi alcelis: malfortiĝon kaj konfuziĝon de l'ruĝa armeo. Parto de l'ruĝgardistoj forlasis la fronton. La hejmurboj ne plu sendis municion en la batalfronton. — La disrompiĝo faktiĝis.

"Spite ĉi-tendencojn la pligranda nombro el tiuj, kiuj ankoraŭ estis armitaj je l' 1. aprilo ne estis malemaj al batalhaltigo, . . . sed ekokazis io, kio ekscitegis la sentojn ĝis la plej alta grado . . .: La antaŭenmarŝo de la regna defend-soldataro je unuopaj lokoj antaŭ la — al ili de l' registaro ordonita — limtempo.

La diskonigita raporto registara, laŭ kiu la soldataro depost la 31. marto ĝis la 3. aprilo estus haltiginta ĉiun antaŭenmovadon kaj nur kie atakoj de l'armitaj laboristamasoj estus donintaj kaŭzon, estus antaŭenpuŝinta batale la trupojn, ĉi tiu raporto estas nomata de la aŭtoro post profunda analizo de l'faktaro "eksterordinare malverŝajna".

Je la informo de l'antaŭenmarŝo de l'soldataro transdonis la centra soveto al la batalgvidantoj jenan ordonon: "La batalo devas esti rompata en ĉiuj cirkonstancoj . . . eĉ tiam, kiam la regna soldataro postsekvas . . . Ni ne donu la kaŭzon, ke la registaro povu nomi la enmarŝon "devigafero" — Nun ekkomencis la "policagado" de s-ro *v. Watter,* dum kiu, kiel la verkanto skribas . . . "je multaj lokoj malgraŭ kontraŭaj penadoj sin venĝis la kolerego de la soldatoj, kiu psikologie eble estis komprenebla, en plej sanga kaj plej kruela maniero je la laboristoj".

Kaj la registaro, la demokrata respublika registaro pro kies defendo kaj protekto la Ruhr-laboristoj levis la armilojn, batalis kaj mortis, kion ĝi faris? Ĝi lavis siajn manojn kvazaŭ Poncio Pilato en la akvo de senkulpeco. La sola ŝirmo, per kiu ĝi distingis la laboristojn estis tiu: Ĝi falsigis la faktojn.

La ministro por internaj aferoj telegrafas al civilkomisaro Thielemann:

"*. . . Registaro zorgis, ke mortpafoj ne okazu . . . Kie mortpafoj okazas, oni nomu tiajn: ekscesoj de la trupo . . .!!*

La zorgoj de l' registaro konsistis el dokumentinterŝanĝo inter Severing kaj la regna defendkomandantaro, kiun li riproĉas, . . . "ke preskaŭ 100 personoj estis mortpafitaj sen ia ajn militista juĝo". Sed por punado de l' ekscesintoj la registaro nek trovis la kuraĝon nek la kaŭzon . . .

En tiaj cirkonstancoj estis regajnata la Ruhr-regiono por la "kara patrio". Sed ni — vidinte kaj mem travivinte, kiel laboristaro trompita kaj per belaj parolturnoj konsoladita jaron post jaro cedis unu akiraĵon post la alia al la ekzekutistoj de la laborista klaso, ni pripensu la historion de l'ĵusa pasinteco kaj — lernu el ĝi.

El diversaj fontoj ĉerpita, ĉefe el la revuo "Aktion" de F. Pfemfert, Berlin, kompilita de Weder 1307.

KORESPONDEJO

2798. Ricevis vian art. Ĝi ne konformas al artikoloj dezirataj por S. pro sia pura teorieco (vidu n.o 23). Ni jam faris escepton kun via prireligia artikolo. Tamen, kiam spaco de felietono permesos, ni tie represos okaze, ne ligante nin. — 2 zl. registritaj. *N. B.*

4280. Kompreneble traduku art. el S. kaj sendu represaĵojn al Red. Ni tre ĝojos.

1072. Mi uzos vian trad. en "Lern."

3020. Verŝajne ili estas tro inertaj. *N.B.*

Preseraro

En la artikolo: *Louise Michel* n-o 23, pĝ. 3, je la 49. linio unu vorto sensenca malhelpas la komprenon de la tuta frazo. Oni legu: *marmovegon* anstataŭ *marmoregon.*

Kion vi faris en tiu ĉi jaro por SAT?

SAT-MOVADO

La ĝenerala kunveno de Lab. Ligo Esperantista en Ĉekoslovakio por SAT

1. marto ĉ. j. okazis la jarkunveno de Lab. Ligo Esp. en Ĉekoslovakio, en kiu partoprenis reprezentantoj de ĉ. 15 grupoj, kiuj kalkulas 500 membrojn. Post la prelego de la ordinaraj jarraportoj delegito de la grupo "Plzen-Karlov" k-do *Stadler* proponis la oficialan aliĝon de LLE al SAT. Tiu propono donis la kaŭzon por tre vigla debato, kiun mi pro ĝia intereso koncize menciu. K-do *Büchl* pensas ke la ligo ne povas aliĝi al SAT, sed nur ĝiaj membroj. K-do *Peŝek,* kiu estis reelektita prezidanto, kompreneble tuj devis havi la parolon en tiu grava afero. "Mi mem estas SATano," li diris, "rigardu jarlibron de SAT! — sed malgraŭ tio mi nepre estas kontraŭ la aliĝo al SAT (bona SATano, ĉu ne?!), tial ke ĝiaj gazetoj tro okupiĝas pri politiko, kaj ni volas kaj devas nepre esti senpartiaj, ni volas resti veraj esperantistoj kaj ne iaj politikistoj ktp. ktp. — Cetere SAT estas pure komunista asocio, subaĉetata de Moskvo.—"

Respondis k-do *Burda:* "Jam unufoje dum ĝen. kunveno de LLE mi venigis al debato tiun ĉi aferon (ankaŭ tiam "satano Peŝek" malhelpis ĝin), kaj mi, hodiaŭ ne estas malmulte surprizita kiam denove venas k-doj kun afero, kies efektivigon mi jam pensis vana. Peŝek aŭ eraras, aŭ intence mensogas kiam li diras ke SAT estas komunista, ĉar al SAT povas aliĝi ĉiu ajn klaskonscia laboristo, tutegale al kiu pol. partio li apartenas. Kaj se en la komitato de SAT troviĝas komunisto, li ne memvole venis tien, sed la tuta membraro lin elektis por plenumi tiun oficon, kaj ĝi ankaŭ fidas al li. Ne ekzistas ĉe SAT la fakto, ke nur delegitoj rajtas elekti kiel ĉe ni, ke unu elektas la alian. Kial ne la tuta membraro voĉdonas en tiu afero, kiel ĉe SAT? SAT absolute ne estas politika organizaĵo, sed celas nur meti esp-on je la servo de la klaskonscia labistaro. Tial estas la devo ke ĉiu lab. esperantisto aliĝu al ĝi. Mi pro tio kore simpatias kun la propono de la grupo Plzen-Karlov kaj deziras ke ni ĉiuj akceptu la proponon." Nun parolas k-doj *Hovorka* kaj *Büchl,* kiuj esprimas sian simpation por SAT. K-do *Stadler,* delegito de Karlov, postulas de la prezidanto Peŝek, ke li voĉdonigu pri tio, sed ĉi lasta nepre volas sufoki la SAT-favoran situacion., kiun kreis la delegito de Karlov kaj komencas denove ĵeti kalumniojn kontraŭ SAT kaj atentigas plie, ke en LLE estas multaj membroj, kiuj samtempe estas UEA-anoj, al kiuj ni (la Ligo) ne povas ordoni, ke ili forlasu UEA kaj transiru al SAT. K-do *Stadler* respondas al k-do *Peŝek,* ke li ne timu la povon de Moskvo tro multe, ke komunistoj do ankaŭ estas laboristoj, same kiel la socialistoj. "Mi pensas, ke ĉiam ni profitos pli multe de SAT ol de UEA, car UEA neniel

povas interesi nin kiel laboristojn, nek la policaj, nek la katolikaj, nek la komercistaj aferoj, nek Espero-Pudro nek Espero-Haŭtkremo (en gazeto "Heroldo"). K-dino *Melkova* (membro ĉe burĝa kaj lab. esp. societo) demandas tiam k-don Burda, ke li klarigu al ŝi kial SAT akceptas subvencion[1] de Moskvo. "Tio certe malhelpas ke ni aliĝu al ĝi." Prez. *Pešek* malpermesas la respondon, ĉar k-do Burda ne estas delegito, sed vane. Oni postulas unuanime, ke li parolu. *Burda:* " Do, por fraŭlino Melkova mi havas mallongan respondon, kiu samtempe kontentigos *Pešek*. Se ili ambaŭ estos tiel bonkoraj kaj subvencios SAT, oni certe ankaŭ akceptos la monon" *(ridoj)*. Pešek ruĝiĝas kaj paliĝas samtempe perdante la forton. "Estas hodiaŭ la okazo decidi, ĉu ni simpatias kun burĝa UEA aŭ laborista SAT kaj ni ĉiuj deziras ke la prezidanto finfine voĉdonigu pri tio." Oficiala delegito de UEA por lab. k-do *Kajzer* parolas: "Mi petas ke vi hodiaŭ permesu ke mi abdiku mian funkcion ĉe UEA kiel UEA-delegito por la urbo Plzen, ĉar mi ne plu deziras fari perfidulon inter vi. Se la plimulto decidiĝas por SAT, ankaŭ mi aprobas." Fine oni petas pri voĉdono, nome: esprimi simpation al SAT kaj rekomendi al la membroj de LLE la aliĝon al SAT. La propono estas akceptita *unuanime* kontraŭ la voĉo de f-ino Melkova. Ŝi restu ĉe UEA kiel semo. Eble iam kreskos ankoraŭ fruktoj sur tiu kampo — kaj Pešek ilin rikoltos. *SAT-ano 409.*

[1] Bedaŭrinde la afabla k-dino eraregas. Ni ja tre dezirus, ke ŝi diris la veron. SAT volonte akceptus subvencion de la IIIa Internacio, same de la IIa kaj de alinumeraj Internacioj, kiuj konsistas el laboristoj. Tio signifus, ke tiuj Internacioj agnoskas la gravecon de nia movado kaj ĝian utilon por la laboristaro.— *E. L.*

Esperanto en praktika uzo

Esperanto pli kaj pli penetras en la vivon kaj ĝoje ni povas konstati ke kvazaŭ organizanto, kulturanto de tiu ĉi enpenetrado pli kaj pli evidentiĝas nia SAT.

Antaŭ kelka tempo aperis ĉe Moskva eldonejo "SVOS" centpaĝa libro ruslingva de nia k-do *E. Drezen:* "Post la limoj. Skizoj pri la eksterlanda socia vivo". Materialo por la libro estas kolektita per Esperanto kaj tion la aŭtoro jene konigas en sia antaŭparolo al la libro:

„Materialo por la artikoloj, apartaj faktoj kaj ciferoj estas prenitaj el Jarlibro de Sennacieca Asocio Tutmonda por 1924 j. kaj el diversaj numeroj de la revuo "Sennacieca Revuo", eldonata de SAT."

Ni menciu ankaŭ ke en la antaŭ nelonge aperinta ĉe la eldonejo „Ĉervony Ŝlan" (Harkov) libro de nia k-do Zilberfarb pri Edukista Internacio kelkfoje estas notita la grava servo, farita de Esperanto al la Internacio.

Ni zorgu multobligi la ekziston de similaj faktoj kaj uzu niajn fortojn por pleje disvolvi la kulturan laboron de SAT — ĝi estas fonto por niaj sukcesoj porlingvaj.

Moskva Satano.

La "neŭtraleco" de la "neŭtraluloj"[1]

Mi konsideris la "neŭtralajn" esperantistojn kaj ilian agmanieron tre konataj al ni, kaj ne raportis pri la epizodo. Sed tion faris la Leningrada k-do laŭ la Estonia "neŭtralula" organo "Informoj", sekve ĝi ne povas speguli eĉ skize la epizodon. Do necesas diri kelkajn vortojn, por ke oni havu pli bonan koncepton pri la "neŭtraleco" reginta en la kunveno.

Kiel ĉiuj "neŭtralulaj" kunvenoj okazis ankaŭ la Estonia jarkunveno sub la nacia kaj esperanta standardoj (baza fakto de l' "neŭtraleco"). En la komenco de mia parolo *H. Sakaria* (frakvestita paŝtisto de l' verda ŝafaro) haltigis min kaj voĉdonigis: ĉu mi estu plue aŭskultata aŭ ne. La voĉdonado rezultigis daŭrigon de mia parolo. Priparolinte la agmanieron de l' "neŭtraluloj" rilate la propagandon kaj oficialigon de esp. (burĝtendenca propagandado, riverencoj antaŭ la ministraĉoj, almozula starado antaŭ la Ligo de Nacioj ktp.) la helverdaj esperantistoj ekalarmis. Tre ekscitiĝis bone konata "neŭtrala" kaj homarfratecon proklamanta esp-isto *V. Vaher*, kiu forŝiris desur si ĉiujn verdajn ĉifonojn kaj vidigis tipe la "neŭtralulojn", kiaj ili efektive estas. Mi citu ĉi tie lian diritaĵon karakterizan:

1) Vidu S. n-o 17.

Skizoj pri nacia kaj kolonia problemo

4]

G. Brojdo

Eĉ migranta komercisto, komerca karavano el la epoko de komenoa kapital-koncentrigo, bezonis unuecon de la lingvo, per kiu li povus trakti kun la aĉetantoj, — unuecon de leĝaro, kiu prezentus por li apogon en liaj komercaj operacioj ktp., ktp. Sed jen aperas la industria kapitalo, kaj en la procedon de socia produktado estas entirataj grandegaj hom-amasoj. Amasa vara produktado postulas kreon de amasa konsumanto de unuspecaj varoj. La kreatan sistemon de merkatoj de disvendo, de krudaĵoj kaj de laborforto kapitalistoj estas devigataj defendi kontraŭ konkurado de alilandaj kapitalistoj. Kune kun tio ĉi kreskas potenca agado de burĝaro por la interna nacia (lingvo, kulturo) kunfandigo de la tuta "popolo" kaj ĝia kontraŭmeto al aliaj landoj, al aliaj popoloj, kiuj prezentas agad-kampon por aliaj naciaj grupoj de monda burĝaro.

Tiu ĉi agado de burĝaro estis difinata de certa teritorio, kiel bazo por ĝiaj ofensiv-movoj kontraŭ la aliaj aŭ nealpropriĝitaj merkatoj.

Tiu ĉi agado montris sin en la formo de starigo de unueca lingvo, de unueca kultura societeco, komuneco.

Rezulte de la komuneco mastruma, teritoria kaj kultura estis formiĝanta ankaŭ certa komuneco de psika trajtaro.

Tia estas la historia vojo de formiĝanta nacio.

Tiamaniere, — nacio estas kuniĝo de homoj, formiĝanta rezulte de la apero kaj de la disvolviĝo de kapitalismo kaj karakteriziĝanta per ekzisto de certaj ekonomiaj kunligoj interne de ĉi kuniĝo, kaj ankaŭ per komuneco de teitorio, lingvo kaj kulturo.

Neniu el tiuj ĉi signoj aparte formas nacion, ĉar nur la sumo de ĉi signoj konsideras la realan historian procedon de la apero kaj disvolviĝo de nacio. Se ni en tiu ĉi difin-formulo forlasos la momenton de historia ligo kun kapitalismo, do la difino taŭgos ankaŭ por la praa ĉasista hordo, kaj por triba organizaĵo, kaj por gento, ĉar ĉiuj ili estas kuniĝoj de homoj kun la komuneco de ekonomiaj ligoj, teritorio, kulturo ktp.

Tie, kie forestas la teritoria komuneco, tie forestas la unueca agad-kampo por certa grupo de burĝaro, tie forestas sistemo de formiĝintaj ekonomiaj ligoj, difinantaj unuecon de lingvo, kulturo ktp.

Kiam forestas la unueco de ekonomiaj ligoj, tiam ne ekzistas ankaŭ nacio. Tiamaniere, transloĝiĝintaj Amerikon angloj, disvolvintaj tie dumdaŭre de jaroj memstaran kapitalisman mastrumon, apartan, kontraŭmetatan al Anglio, prezentas el si apartan nacion, kvankam ili parolas la saman lingvon kiel la angloj.

Du nacioj povas paroli en unu lingvo. Ili fariĝas diversaj nacioj, se iu ajn signo de nacio (mastruma komuneco, teritorio) ĉesas esti komuna.

6. Kiel burĝaj kaj kelkaj socialistaj scienculoj komprenas nacion?

Fundamenta trajto de ĉiuj burĝaj kaj social-kompromisemaj (revizionistaj, oportunistaj) difinoj de la nacio konsistas en tio, ke ili estas direktitaj por ne montri la cirkonstancon, ke la nacio estas fenomeno historia, ke ĝi havas sian komencon kaj sian finon.

El la vidpunkto de la klasaj interesoj de la burĝaro, ili estas konsekvencaj. La burĝaro estas sange interesita pri tio, ke el ĝiaj manoj ne estu forprenita unu el gravaj organizaj iloj. La nacio — estas organizaĵo, ebliganta al burĝaro nebuligon de klaskonscio, fortroton de klasaj kontraŭdiroj en la plej akraj momentoj de ĝia batalo kiel kontraŭ la proletaro, tiel ankaŭ kortraŭ alinacia burĝaro.

Konfesi, ke nacio estas fenomeno historia, tio signifas ŝanceligi la neŝanceliĝon de nacio, ĝian starigon "poreterne" flanke de dio, naturo aŭ de "racio".

Nome per tio estas difinata en burĝa scienco kunmikso de konceptoj pri raso kaj nacio.

Raso — estas sumo de signoj ĉe homaj specoj, formiĝintaj pro naturaj kondiĉoj, en kiuj vivis la pra-homo: klimato, malseko de aero, geologia strukturo de la enloĝiĝa regiono, ĝia florio kaj animalio ktp.

Raso — ĝi estas homo, kiel parto de la naturo.

Nacio — ĝi estas kuniĝo de homoj, aperanta nur sur la difinita historia ŝtupo de socia disvolviĝo.

Raso kaj ĝiaj signoj ŝanĝiĝas malrapide (samkiel la tuta naturo) kompare kun la rapidaj ŝanĝoj, okazantaj en la homo surbaze de ĝia socia disvolviĝo. Tio ne sufiĉas, — en la procedo de evoluo de la homa socio la rasaj signoj mem ŝanĝiĝas sub la influo de disvolviĝanta tekniko, de produktaj fortoj kaj de okazantaj en la kunligo kun tio ŝanĝoj en la produktaj kaj sociaj interrilatoj.

La burĝa scienco, unuigante la konceptojn pri nacio kaj raso, kreante "eterne" neŝanĝeblajn signojn, kreas kaj propagandas teorion pri konstantaj ecoj kaj pri la antaŭdifino de la "sorto" de popoloj.

Turkoj kaj hindoj, surbaze de tiu teorio, estas raso, dorlotita de la klimato kaj nekapabla al progreso, kaj tial gvidenda flanke de eŭropa kulturo, t. e. ekspluatado flanke de eŭropa kapitalismo. *Elrusigis P. Jakovlev.*

(Finota).

“For la agentojn de l’*juda*[2]) registaro“ (la “neŭtraleco“ rilate la rasojn, gentojn kaj naciojn).

Aginte laŭ la sperto, ke malvero nur povas sin defendi kontraŭ vero per perforto, la prezidanto *J. Turn* ĉesigis mian parolon kaj ankaŭ ne permesis paroli al aliaj Satanoj ĉeestintaj la kunvenon, sekve restis nur unika vojo fini ĝin.

Dio gardu ilin de l’ “sovaĝaj“ (revoluciaj) esp-istoj, por ke ili povu babili pri la interna ideo sub la nacia standardo! *Otto Sall.*

KRONIKO

Germanio

Oschatz (Saksio). La urba konsilantaro decidis, de pasko enkonduki esp-on en la ĉiloka popollernejo kiel fakultativan fakon, kondiĉe ke partoprenas minimume 15 lernantoj. Sed jam hodiaŭ sin anoncis pli ol 30 infanoj. Instruos instruisto de l’sama lernejo s-o Merkel, du lecionojn posemajne. *E. Fr.*

Sovet-Unio

Kremenĉug. Okazis en nia urbo tre kurioza fakto. Lernantoj de 3a labor. lernejo pendigis plakatojn sur muroj, pordoj k. eĉ plafonoj de sia lernejo, kun surskriboj: “For la germanan kaj francan lingvojn! Ni deziras lerni intern. lingvon Esp. Vivu Esperanto!“ Dum germana leciono en klasoj estis malplene. Ĉiuj lernantoj de 4, 5, 6, 7 grupoj postulas de administracio instruadon de esp. en ĉiuj grupoj, kiel devigan objekton, anstataŭ germ. kaj franca lingvoj. — En nia urbo SAT-anoj disgluis afiŝojn pri SAT kaj revolucia esp-istaro. En poŝtejo, en ejo de Distriktkomitato RKP, en ĉiuj lab. kluboj, lernejoj kaj oficejoj pendas ĉi-afiŝoj presitaj de nia organizajo “Laborista Solidareco“. — En murgazeto de muziklernejo mi lokigis grandan art. pri SAT kaj esp. La esp. movado vigliĝas. Ni, ĉi-tieaj SAT-anoj estas entuziasmigitaj. Ni laboros kaj ni venkos. *I. Avrunin (1122).*

Murom. Fondiĝis esp. rondeto el 9 k-doj (membroj de kom. junularo), ĉe loka Partia Lab. Klubo. Instruanto kaj gvidanto k-do Osipov. Baldaŭ ni organizos la 2. grupon el lernantoj de loka Profes. teknika lernejo. *A. O.*

Leningrado. — Organiziĝis Leningrada Grupo de Sennaciuloj en kiu unuiĝas ĉiuj leningradaj SAT-anoj. Ĉiusemajne okazas raportoj pri diversaj temoj. En du urbdistriktoj funkcias perfektigaj rondoj por SAT-anoj. Krome ĉe la Grupo laboras Marksana rondo.

Agitkomisiono de Centra kaj Petrograda Distriktaj Komitatoj de Rusia Kom. Partio (en la urbo estas 6 distriktoj) akceptis rezoluciojn en kiuj ili rekomendas al la laboristaj kluboj organizadon de esper. rondoj kaj proponas al la kom. frakcioj de la kluboj ĉiel helpi al la laboro por organizo de la rondoj. La rondoj funkcios same, kiel ĉiuj aliaj kaj la rondgvidantoj estos pagataj. Ambaŭ rezolucioj, despli ke tiu de la Centra Distrikto valoras por la tuta urbo, tre helpas la laboron kaj post nelonga tempo estos eble organizi multe da novaj rondoj. *Geo. Teterin.*

Niĵni-Novgorod. Niĵni-Novgoroda Gub. Filio de SEU disvolvas nun laboron en larĝaj laboristaj masoj. Granda prepara laboro jam estas farita. Dum la pasinta jaro, precipe lastaj monatoj, estis disvastigita en la urbo kaj gubernio ĉirkaŭ 2500 (dumil kvincent) ekz. da diversa esp. literaturo. Dum la jara ĝenerala kunveno de la Filio la 1. febr. estas decidite definitive transiri al la nova metodo de laboro en ĉeloj. Dum febr. estas faritaj multaj raportoj en diversaj organizajoj. Inter ili estas: Partia ĉelo ĉe urba komitato de Rusa Kom. Partio, Plenkunsido de lokaj komitatoj de Prof. Sindikato de Sovetaj Oficistoj. (Dum ĝi oni decidis organizi ĉelojn ĉe ĉiu loka Komitato, aĉeti esp. literaturon por biblioteko de la Sindikato, peti fari raportojn por oficistoj en ĉiuj oficejoj). Malfermita partikunveno ĉe laboristoj de Ligilo. Komuna kunveno de partiaj ĉeloj ĉe lokaj transportistoj kaj ĉe kelkaj uzinoj. Kunveno de 5. rajona fako de la Sindikato de kultur-klerigaj laborantoj. Kunveno de oficistoj de Administra Fako kaj de milicanoj. Kunveno de oficistoj de Gub. Teradministrejo Kunveno de ĉelo de Komunista Junulligo ĉe transportlaboristoj. Kunveno de laboristoj en Kudrotrusto. Raportoj estas farataj preskaŭ ĉiutage. Ĉie estas granda intereso por esp., oni decidas organizi ĉelojn kaj komenci la lernadon. Ĉe laboristoj de Ligilo la ĉelo jam havas 100 personojn. Tie estas gvidataj du kursoj. Por havigi al la organizataj ĉeloj perfektajn esp. instruistojn, ĉe Gubernia Filio estas malfermita kurso por 30 instruistoj. Komenciĝas ankaŭ laboro en la Gubernio, kien estas senditaj specialaj propagandistoj. Disvastigi larĝe la laboron ege malhelpas alta kotizo, starigita de Centra Komitato de SEU, — 1 rub. pagenda tuj post aniĝo. Tiu kotizo fortimigas multajn laboristojn, ne havantajn grandan salajron. Necesas la kotizon plej baldaŭ malaltigi kaj doni pagprokraston.

Adreso de la Filio de nun estas: Polevaja, 35, *Niĵni-Novgorod,* Sovet-Unio. Ĉiusemajnaj kunvenoj dimanĉe je la 1a. Esperanta legejo malfermita ĉiuvespere.

2) Tiele li nomis la registaron de USSR.

RECENZEJO

Gazetoj

Represis artikolojn el S.: *The Young Socialist,* Bradford, marto, Malriĉuloj (S. 13). *Le Cri des Jeunes,* St. Etienne, febr., Infanl. en Usono (S. 1). *Romániai Népszava,* Cluj, 15. febr., Infanl. en Ŝanhaj (S. 9), Marks en tatara lingvo (S. 6). *A Világ,* Targu Mureŝ, 28. febr., Situacio en Usono (S. 1). [Pro certaj kaŭzoj ĉilastaj du rumanaj gazetoj hungarlingvaj ne menciis devenon de l’ art., kun nia konsento.] *Molodaja Gvardija* (Juna Gvardio), Blagoveŝĉensk s/A. — 12. dec. 1924: Infanlaboro en Ameriko (S. 1). *Proletarskij Putj,* (Proletara vojo), Uljanovsk. — 8. jan. 1925: Vivo de laboristo en Latvio (S. 11). 12. jan. 1925 Je kio oni ne elŝparas (S. 12). 14. jan. 1925 La vivkondiĉoj en Loanda (S. 12). *Vlastj Truda,* Irkutsk — 30. okt. 1924: Letero el Bulgario, (S. 2). *Naŝ Putj* (Nia Vojo), Velikie Luki. 31. dec. 1924 Kapitalismo en Ĉinio (S. 7). 17. febr. 1925 Kiel vivas laboristoj en Estonio (S. 15) en du lastaj artikoloj la deveno ne menciita.

Div. notojn enpresis: *Norsk Bokbinder-Tidende,* Oslo, febr., pri kaj en esp., *Der Kriegsteilnehmer,* Wien, marto, pri kaj en esp., *Le Semeur de Norm.,* Caën, 25, febr., Esp. vivanta lingvo. *Fructidor,* Mahon (Balearoj), 21. febr., poemo pri esp.

TRA LA KLASBATALO

Eksplodis ampleksa striko de la germanaj fervoj-laboristoj pro la mizeraj salajroj.

En Reinsdorf apud Vitenberg (Meza Germanio) okazis dinamit-katastrofo en la tieaj grandaj dinamitfabrikejoj, je kiu perdis la vivon 12 laboristoj.

La grekaj fervojistoj komencis striki.

En Nova Skotio (Aŭstralio) strikas ĉ. 12000 minlaboristoj.

En Francio okazas telegrafista striko, de P.T.T. kiu de Paris etendiĝis al la provincaj urboj, Lyon, Alger, Oran, Roubaix-Tourcoing, Clermont-Ferrand. — La striko de junaj poŝtistoj fariĝas pli kaj pli ĝenerala. Jam en Paris estas 1500 strikantoj.

Preskaŭ la tuta komunista gazetaro en Germanio estas malpermesita je daŭro de du ĝis kvar semajnoj pro alvoko kaŭze de la morto de Ebert.

Nacilingvaj SAT-propagandiloj!

Ruslingvanoj havas eblecon nacilingve propagandi por SAT, mendinte agitplakatojn pri Esp-o kaj SAT (“Internacionalnij jazik mirovogo proletariata Esperanto“) ĉe la Societo “Laborista Solidareco“ (adr.: Kremenĉug, V. Kolĉinski) —.

Prezo: 100 ekz. 1,80 r.; 10 ekz. 20 kop. Oni aldonu por poŝt-afranko 20 %. Livero post okazinta pago.

Rezulto de la ĝenerala voĉdonado

pri la proponoj debatitaj dum la IVa kongreso en Bruxelles (aŭgusto 1924)

Partoprenis la voĉdonadon 735 voĉdonrajtaj kamaradoj

Propono 1 akceptita	Aprobis	602
	Malaprobis	112
	Nevalidaj	21
		735
Propono 2 akceptita	Aprobis	701
	Malaprobis	15
	Nevalidaj	19
		735
Propono 3 akceptita	Aprobis	663
	Malaprobis	58
	Nevalidaj	14
		735
Propono 4 akceptita	Aprobis	493
	Malaprobis	215
	Nevalidaj	27
		735
Propono 5 malakceptita	Aprobis	276
	Malaprobis	408
	Nevalidaj	51
		735

Por la ĝusteco kaj ordeco signas la komisionanoj plenumintaj la nombradon de l’voĉoj: W. Köhler (1613), M. Koukol (1612), Klara Lehmann (913), F. C. Richter (125), W. Vogel (174), Alb. Weinhold (2568).

Leipzig, 4. marto 1925.

Neuzitajn manuskriptojn ni ne resendas — Represo de artikoloj permesata nur, se oni citas la nomon de nia organo kaj sendas al Red. du ekz. de la represaĵo.
Jarabono: **Argentino** 6 pesos; **Aŭstrio** 120000 kr.; **Belgio** 36 fr.; **Brazilo** 13 milr.; **Britio** 110 penc.; **Bulgario** 220 lev.; **Ĉekoslovakio** 60 kr. ĉ.; **Danio** 10 kr. d.; **Estonio** 650 mk.; **Finnlando** 70 mk.; **Francio** 35 fr. fr.; **Germanio** 8 mk. or.; **Hispanio** 13 peset., **Hungario** 8 kr. or.; **Italio** 36 lir.; **Japanio** 4.50 jen; **Jugoslavio** 130 din.; **Litovio** 16 lid.; **Nederlando** 6 guld.; **Norvegio** 14 kr. norv.; **Polio** 8 zlot.; **Portugalio** 40 esk.; **Rumanio** 350 lej.; **Rusio** 4 rubl. or.; **Svedio** 8 kr. sved.; **Svisio** 10 fr. svis.; **Usono** 2.50 dol. — **Ankaŭ 1/4 jare abonebla. Ponumera prezo:** 0.20 mk.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG